

# ANEBR I ETO N-ro 182

町田エスペラント会  
Esperanto-klubo de Maçida



## Feliĉan Novjaron 2022 !

町田エスペラント会 総会のお知らせ

日 時 : 3月6日(日) 10時00分~11時00分

場 所 : 町田市生涯学習センター8階 学習室5

議 題 : 活動報告と決算報告、新年度活動計画と予算、役員改選

新型コロナウイルスの影響により日程が変更された場合は、メーリングリスト等によりお知らせします。

下記をお願い事項についてご理解の上、ご出席ください。

町田市生涯学習センター「ご利用のみなさまにお願いすること(確認リスト)」より

- ① 検温をしてから来館してください。発熱等の症状がある場合は参加しないでください。
- ② 施設入退場の際に、**手と指の消毒**をしてください。
- ③ 使用責任者の方は当日の参加者の氏名・連絡先を把握しておいてください。
- ④ 換気をしてください。学習室等の扉を開けて活動してください。
- ⑤ 館内では**マスクを着用**してください。
- ⑥ 他人との距離を2メートル以上とってください。一つ飛ばしに座ると、距離を確保しやすいです。
- ⑦ 活動前に、備品やドアノブを消毒してください。机や椅子を使用した場合は、施設管理者が用意した消毒液で消毒をしてください。
- ⑧ その他

施設利用の翌日から起算して14日以内に新型コロナウイルス感染症を発症した場合は、施設管理者に速やかに報告してください。

2022年1月

## 第 29 回 (2021 年) ザメンホフ祭 報告

日 時 : 2021 年 12 月 11 日 (土) 10 時 30 分 ~ 12 時 00 分

場 所 : せりがや会館 4 階第一会議室

参加者 : 明石、上農、金子、河合、桐山、クーヴェ、鳥居、永木、早川、実沢、山本  
(敬称略) 計 11 人

S-ino 上農の司会で、La Espero 斉唱、ドイツ滞在の木村会長からのメッセージ紹介後、参加者全員が「この一年を振り返って」というテーマで、コロナ禍における近況をエスペラントで報告した。

引き続き、s-ro 早川によるエスペラント版のチョコチョコゲームと s-ino 上農による単語クイズをして盛り上がった。

チョコチョコゲームとは、連想ゲームの逆で前の人が出た言葉と全く関係のない言葉をつなげていくゲームである。とにかく知っている単語を言えばよいと始めたが、連想できる単語しか思い浮かばなかったり、大丈夫と思った単語も、「連想できる」と指摘されたり、意外と難しかった。

単語クイズ(vortoludo)は、次のような説明から始まった。

La vortojn, kiuj rilatas al monato, decembro, mi preparis al vi. En via vico vi rajtas diri unu esperantan literon el 28.

クイズの進め方は、

1. エスペラントの単語の文字の数の○を黒板に書く。  
例えば、frosta に対して 6 つの○を用意する。
2. 自分の番がきたらエスペラント文字 28 から 1 つ選んでいう。それが○のどれかに当てはまったら担当者は該当の場所にその文字を書き込む。
3. ある人が「a」を選んだら、その文字は 6 つ目のところにあるので、その場所の○に「a」を書き込む。○○○○○「a」
4. すべての○に文字が埋まったらその単語の意味を考える。すべてが埋まる前に分かったら答えてもよい。

以上のように、用意した単語を同じように進めていく。

当日用意した単語は frosta, prujno, Ludoviko, vintra, solstico, Krist'o'nasko, silvestro であった。時間の関係で終わりの単語二つは出題できなかった。

町田エス会として実際に会合を持ったのは、ほぼ 2 年振り、ゲスト不在でマスク越しではあったが、楽しい時間を過ごすことができた。



報告: 山本



..... 会長のメッセージ .....

Karaj klubanoj,

Kia ĝojo, ke ĉi-jare Z-festo povas okazi! Ĝis antaŭ du jaroj, eble ni ne estis konsciaj kiom kara tiaj rektaj renkontiĝoj estas. Oni simple supozis, ke kunvenoj kaj festoj simple okazas laŭ la planita tempo. Sed nun, spertinte, aŭ pli bone spertante la pandemion, ni povas pli danke ĝui tiajn okazojn. Estante nun en Germanujo, kie la kronviruso denove disvastiĝas, mi nun denove spertas, ke „normala“ vivo kiel antaŭe ne eblas. Bedaŭrinde mi ne povas partopreni, sed esperas al vi agrablan festkunvenon!

Kore salutas, via Kimura Goro Christoph

..... この一年を振り返って .....

### Mia plano kaj rezulto en 2021

KIRIYAMA Masaaki

En la fino de la jaro 2020 mi decidis mian planon por 2021. Kaj la rezulto estis....

#### CELO

Plano 1. Mi ludu tenison 3 fofojn semajne. Alivorte mi ludu tenison 150 fofojn en 2021.

Por korpa sano. (En 2020, mi ludis nur 96 fofojn pro la pandemio.)

Plano 2. Mi fotu 4,000 fotojn jare. Por mensa sano. (En 2020, mi fotis 2,521 fotojn.)

Plano 3. Mi legu 2,000 paĝojn en Esperanto. Por cerba sano. (En 2020, mi ne kalkulis kiom da paĝoj mi legis, sed certe malpli ol 1,000 paĝoj.)

#### REZULTO

Plano 1. Iom multiĝis, sed ne atingis la celon. Mi ludis 122 fofojn. Ĉar mi ne antaŭvidis la longdaŭron de la pandemio. Longan tempon tenisludejoj estis fermitaj.

Plano 2. Tute ne atingis, eĉ malmultiĝis ol 2020. Mi fotis nur 2412 fotojn. Ankaŭ pro longdaŭro de la pandemio, mi ne povis vojaĝi/vojaĝeti por fotadi.

Plano 3. Superis la celon. Dank' al la stagnado de la planoj 1 kaj 2, restado hejme pli multiĝis. Mi legis ĉirkaŭ 3,000 paĝojn jare. Tio signifas, ke mi legis 8 paĝojn ĉiutage.

Komento ; La libroj, kiujn mi legis, estas "Originalaro de Zamenhof". Ĝi estas parto de "Plena Verkaro de Zamenhof", kaj konsistas el tri dikaj libroj.

### Kion mi faris en 2021

NAGAKI Masako

Dum ĉirkaŭ du jaroj ni estas en pandemio de KOVID-19. Tio devigis min resti en mia domo. Kion mi faris en tiu limigita situacio ?

Mi relegis mian taglibreton.

<コンサート>

En februaro, dum la dua deklaro pri krizostato, mi iris al koncerta halo en Sagamiono por ĝui koncerton de Sada Masasi, kiu estis prokrastita de la lasta majo. En tiu periodo ĉiuj artistoj devis ĉesigi siajn prezentaĵojn antaŭ spektantoj. Li rekomencis koncertojn kun sufiĉaj zorgoj, de septembro en 2020, kaj en ĉi-jara oktobro okazis lia 4,500-a koncerto. Feliĉe ĝis nun neniŭ spektanto infektiĝis.

Tiu okazo estis mia nekutima afero en tiu ĉi-jaro.

<数独>

En tiuj unutonaj tagoj mi trejnis mian cerbon en Sudoku, cifera enigmo.

Sudoku estas la varomarko de eldonejo Nikoli kaj devenas el mallongigo

de "Suĵi wa dokuŝin ni kagiru"(Je fraŭleco neniu estas pli bona ol nombro). Pro la varomarka problemo aliaj uzas Number Place(mallongige Nampre). Oni metas ciferojn de 1 ĝis 9, en kvadratan kadron de 9×9, dividita en blokojn de 3×3. La plenigado de la krado necesigas paciencon kaj logikon. Mi ludas ĝin per mia komputilo. En iu retejo oni proponas 10 demandojn de kondukajn ĝis malfacilegajn ĉiutage. Mi solvas 5 demandojn de mezgradajn ĝis malfacilegajn.

#### <読書>

Alie mi legis librojn. Ofte mi pruntas ilin de biblioteko de urbo Yamato. Anticipe mi petas librojn, kiujn mi volas legi, kaj ricevas ilin en ties filio en Ĉuourinkan. Nun mi legas "Come, come, everybody – La epoko de Hirakawa Tadaĉi kaj radio-angla konversacio (カムカムエヴリバディ - 平川唯一と「ラジオ英語会話」の時代)". Nun NHK elsendas televiddramon kun sama titolo, "Come, come, everybody" ĉiumatene krom dimanĉo. La rakonto estas fikcio, sed Hirakawa Tadaĉi estas ununura reala persono en ĝi. Kaj en la dramo, la rolon de Hirakawa ludas Sada Masasi .

#### <英語会話の心得>

Hirakawa estis gvidanto de radio-angla konversacio de 1946 ĝis 1951 en NHK. Komenco de la leciono li alparolis aŭskultantojn jene:

"Beboj iom post iom lernas vortojn kaj povos paroli per unu vorto. Tio estas tre natura kaj ne postulas ajnan apartan penon aŭ studon. Ni efektive plenumu la sekreton de la bebo."

Laŭ tiu sekreto de la bebo, li petis aŭsklutantoj fari kvin aferojn por sukcesi en la angla konversacio.

- 1 Ĝuu ludi anglan kiel viaj ŝatataj ludiloj.
- 2 Imitu la prononcon kaj tonon de vortoj de instruisto.
- 3 Partoprenu almenaŭ du personoj, prefere kun gepatroj kaj infanoj.
- 4 En via ĉiutaga vivo uzu la vortojn, kiujn vi lernis.
- 5 Ne pensu nenecese por paroli plenan anglan.

Ni anstataŭigu anglan per esperanto kaj ni praktiku la sekreton de la bebo. Ne timu erari, ni simple amuziĝu ludante.

Iam la gvidanto varbis rakontojn, kiujn elpensis aŭsklutantoj, kaj fakte uzis ilin en la leciono. En la teksto, "come come baby, speciala numero" estis rakontoj, kiujn oni uzis en la konversacio. Kaj tie mi trovis iun nomon.

— "rainy Day"(雨の日) 静岡県 栗田公明 —

Estas tiu konata esperantisto, ĉu ne ?

Se vi havas intereson pri ĝi, mi rekomendas legi ĉi tiun libron.

## Mia ĉiutaga vivo

Yamamoto Misato

Ekde eksplodo de la kronviroza pandemio mi pasigas multe da tempo hejme krom aĉetado, vizitado al hospitalo kaj promenado. Nu mi prezentos ĉi tie du lernokunsidojn de Esperanto kaj klubon de te-ceremonio de la Nefermita Universitato de Japanio (放送大学). Tiuj tempoj apenaŭ ligas min al la malfermita socio per Skype, Line kaj Zoom.

### 1. La sabata lernokunsido de Esperanto-Klubo de Maĉida (per Skype)

Ĉiusabate de la 14:00 ĝis la 15:30, ni havas lernokunsidojn per skype. Unue ni ĝuas liberan konversacion kaj due lernas per la libro “Faktoj kaj Fantazioj”

La tempo de konversacio estas valora por paroli en Esperanto. Pro mia pasiveco estas malfacile paroli multe, sed ĝi estas sufiĉe amuza por mi.

Lerni libron donas kutimon de antaŭlernado al mi. Se ne estus la lernado, mi ĉesus serĉi nekonatajn vortojn per vortaro, ĉar mi estas maldiligenta. Tiuj ĉi tempoj estas tre gravaj por kontakti membrojn.

### 2. Lernokunsido de "cerbo-trejnado" (脳トレ) de la Katmana Domo (ねこの手) (per Line)

De la 13:00 ĝis la 15:00 lunde de la dua semajno kaj merkrede de la kvara ni havas lernokunsidojn en Katmana Domo. Ĉiuj lernantoj krom mi reale ĉeestas, sed mi rete per Line.

La Katmana Domo estas proksime de stacio Gumyoji en Jokohamo, do mi bezonas ĉirkaŭ 90 minutojn unudirekte per trajno, sed nun mi ne bezonas tiom da tempo pro reta ĉeesto.

Tamen tia situacio ĝenus la gvidantojn, aliajn lernantojn kaj eĉ min, do mi volas reale partopreni en ĝi kiel eble plej baldaŭ sen timo pri kronviruso.

En la lundaj kunsidoj ni lernas kiel esperantigi popularajn kantojn. Kaj poste ni kantas la esperantigitajn kantojn. La kantoj, kiujn ni tradukis, estas “Hieraŭ (Yesterday), Floro de La Pasio(情熱の花), Kanto de La Vivo(いのちの歌), Milion’da Rozoj(百万本のバラ), Falas Blanka Neĝo(雪が降る), Foto de La Klaso(卒業写真), Amo estas Blua(恋は水色)” ktp ĝis nun.

El tiuj kantoj la plej memorinda por mi estas “Milion’da Rozoj”. Kubota Saki, Kato Tokiko kaj aliaj kantis ĝin. Mi havis intereson pri fono de la kanto kaj diferenco en la tekstoj, ĉar mi aŭskultis ĝin per YouTube multfoje.

Alie, ni lernas la lingvon ankaŭ per la libro “Gerda malaperis” lunde gramatike kaj merkrede konversacie. Ĉar tiuj ĉi lernokunsidoj celas cerban trejnadon, uzante viglitan cerbon ni pasigas amuzan tempon per Esperanto.

### 3. La klubo de te-ceremonio de La Nefermita Universitato de Japanio(放送大学) (per Zoom)

Ĝis nun, ni havis grupkunvenojn dufoje monate en la studcentro de la regiono Tama, sed pro la kronviroza pandemio la universitato estis fermita dum preskaŭ du jaroj de la direktoro. Nia grupo do decidis okazigi la kunvenojn per Zoom.

De la 13:00 ĝis la 16:30 dufoje monate ĉirkaŭ 12 membroj partoprenas per zoom. Ĉar ni ne povas okazigi realan te-ceremonion per zoom, ni lernas kiel fari ĝin per video kaj inersanĝas informojn unu kun la alia pri alilokaj te-ceremonioj kaj niaj universitataj studoj. Mi sentas, ke la nova ligilo konsciigas al ni nian personecon kaj vivstilon, kiun ni ne rimarkis ĉe la reala renkontiĝo.

Kiel vi povas vidi, nia nuna vivo ne estas sama kiel la antaŭa pro la kronviroza pandemio, sed mi ankoraŭ fartas bone uzante tiujn tri ligilojn. Mi atendas la tagojn, kiam mi povos renkonti vin ridante kun sano kiel antaŭe.

Kia jaro estis ĉi-jaro !

TORII Fusako

Mi havis nenian bonan novaĵon ĉi-jare.

La plaj malproksima loko, kien mi veturis, estis “Sinyurigaoka”, tria stacio de “Tamagawagakuenmae” (mia stacio).

Mi deziras vivi vigle en la venonta jaro.

Mia mirinda laboro en 2021

Ueno Yuriko

< Mi forĵetu fatrasojn.>

Lastatempe mi ŝatis spekti la programeron ‘Dan-Ŝa-Ri’ de iu televida kanalo. Dan-Ŝa-Ri konsistas el japanaj vortoj kaj mi esprimas la vortojn en Esperanto, ‘Fortranĉo – Forĵetado – Forlaso’ .

Profitante helpanton mi kontrolis la kabaneton, en kiu mi lasis fatrasojn dum pli ol tridek jaroj, ekzemple, fajraĵojn, du batilojn, radĉenon, kelkajn ombrelojn, kartonojn, kemiaĵojn, sakon da rizŝelo kaj tre gravajn ekipaĵojn por granda tertremo. Tiuj aĵoj dormadis longe kaj okupis la lokon kun senutila balasto.

Post la kontrolo mi dividis ilin en du partojn – bruligeblajn, nebruligeblajn. Kaj mi dividis nebruligeblajn aĵojn, grandajn aŭ malgrandajn. Ĉar laboristo pri rubaĵo vizitas ĉiun hejmon kaj portas malgrandajn nebruligeblajn po unu fojon ĉiu du semajne. Kiam oni petas grandajn, oni pagas la prezon laŭ la nombro. Ankoraŭ granda laboro restis. Tio estis boteloj. Kiam oni petas de la laboristo pri la rubaĵoj porti botelojn vitrajn aŭ plastajn, oni devas vakigi ilin. Mi faris tion uzante liberan tempon dum du, tri monatoj.

Nun la kabaneto havas spacon. Pro tio mi facile elprenas aĵon laŭbezone.

Per kia rimedo mi studis Esperanton dum kronvira pandemio

AKAŜI Fumiko

Por mi pli ol 80-jara memori estas tre malfacile kaj mi tuj forgesas. Eĉ mia domlaboro ne iras glate. Kaj pli kaj pli mi ne povas havi tempon por studi Esperanton. Tiutempe mi estis vokita de Maĉida esperanto klubo, “Ni studu Esperanton per skajpo en ĉiumardo kaj sabato”. Tiam mi ne uzis skajpon sed pro helpo de aliaj membroj mi povis partopreni en skajp-grupo. En sabata kunsido okazis libera konversacio. Por mi konversacio estis malfacile aŭskultebla. Nun mi partoprenas en marda kunsido, en kiu ĉeestas 3 personoj. En la kunsudo nun ni legas verkaĵon de Julian Modesto. La vortoj kaj enhavo de la libro estas relative facilaj kaj interesa. Ni legas 2 paĝojn en unu fojo. En la dua mardo ni studas “Facila Frazfarado”-n, “Novaĵoj Hokitaj de Okita”-n kaj “Krucvorto”-n en “La Revuo Orienta”. Tio estas kiel plej multe.

緊急事態宣言を受けて中止になっていた2021年度第32回町田エスペラント会総会が、12月11日(土)10時からせりがや会館において開催され、2020年度活動報告及び決算報告と2021年度の活動計画及び予算が承認されました(内容については、AMEBRIETO N-ro180に掲載のとおり)。また、役員について、副会長の木島さんから、健康上の理由により辞任の申し出があり、了承されました。後任については、2022年度の総会で選出することとし、その他の役員については継続していただくことになりました。

出席者：明石、上農、金子、河合、桐山、クーヴェ、鳥居、永木、  
実沢、山本 10人



## あ と が き

☆ 昨年12月感染者数減少の中で、2021年度総会とザメンホフ祭を無事開催することができたのは幸いでした。国内で新型コロナウイルスの感染者が初めて確認されてから2年。ワクチン接種が進み昨年秋から急速に収束に向かったのもつかの間、新たな変異株の急拡大で今年も先が見通せない状況です。学習・交流の場が持ちにくい事態が続きそうですが、当会の目的「会員の語学力の発展向上と会員相互の親睦を図るとともにエスペラントの普及を図る」ため、新年度の活動について皆で知恵を出し合い、なんとか会を盛り上げていきましょう。(M)